

Letero el Ĉeĥoslovakio.

Karel Čapek.

Priskribante Ĉeĥoslovakion, ni ne povas eviti vicon da kontraŭoj. Oni ekzemple envicigas ĝin inter malgrandajn ŝtatojn certe pro tio, ĉar de nordo al sudo ĝi estas apenaŭ pli granda ol Belgio aŭ Holando; sed kontraŭe de oriento okcidenten ĝi estas ĝuste tiel longa, kiel Germanujo de Bohemio ĝis la golfo de Dancigo, kiel Granda Britujo de la orkneja insularo ĝis Plymouth, kiel Francujo de Calais ĝis la Pireneoj kaj kiel Italio de la Alpoj ĝis la golfo de Taranto. Laŭ la grandeco ĝi estas inter la eŭropaj ŝtatoj sur la 14-a loko, sed sur la 9-a loko laŭ la nombro de sia loĝantaro.

Sed la linio kuranta de l' oriento al okcidento signifas multe pli: ĝi montras tiom da diferencoj en la civilizacio, kiom la linio de Manchester aŭ Lilie ĝis Kaŭkazo. En la okcidento de nia respubliko vi trovas la tipan nordokcidenton de la tuta Eŭropo, nome: fortan, tre evoluitan industrion, intensivajn kaj racian terkulturon, kaj ekstreme aktivan, meĥanikigitan urban vivon. Sed irante laŭ tiu ĉi linio orienten vi trovas regionojn kaj vivon multe pli simplajn, pentrindajn kaj primitivajn. Vi venas al lignaj vilaĝetoj, kiuj neniel distingiĝas de malriĉaj rusaj vilaĝoj. Niaj okcidentaj regionoj estas same brilaj kiel Birmingham, Charleroi aŭ Pittsburg; sed oriente restas la naturo kaj popolo, ĝiaj kostumoj kaj kutimoj, la samaj, kiel antaŭ jarcentoj, ja eĉ jarmiloj; ili estas unikaj sur la kontinento. Tiuj ĉi naŭcent kilometroj estas ĉeno de diversaj civilizacioj, trovebla en neniu alia ŝtato de Eŭropo. Ne estas do nia lando tiel malgranda: ĝi estas Eŭropo en miniaturo.

Rigardante la landkarton de Eŭropo, ni vidas, ke tiu ĉi iom longa Ĉeĥoslovakio okupas inter nordo kaj sudo, okcidento kaj oriento preskaŭ la mezon de la kontinento. Esti en la mezo de Eŭropo signifas, partopreni ankaŭ intensive **plenforte** ĝian historion. Tiun ĉi landon evitis neniu raso, neniu ondo de l' kulturo aŭ ideo. Eble nenie oni elfosis el la tero tiom da atestoj el pratempaj epokoj: de l' homo loĝanta en kavernoj ĝis ĉasisto de mamutoj, en tavoloj de ĉiuj kulturoj ripozas homaj ostoj depost 50 mil jaroj ... vera krucovojo de l' pratempa Eŭropo. Tie ĉi troviĝis la norda limo de l' Roma Imperio, tiun ĉi montaron, la nunan limon, transiris Galloj, Germanoj kaj Slavoj, tie ĉi haltiĝis la invadoj de l' Tataroj kaj Turkoj, tie ĉi havis en la 4-a jarcento la roma kulturo sian bazon najbare de la proksima oriento. Tiu ĉi tero naskis la reformacion, sur ĝi ekestis la milito inter la suda katolicismo kaj norda protestantismo, milito, kiu forrabis duonon de l' popolo kaj neniigis ĝian spiritan vivon.

Ni pripensu ankoraŭ unu momenton la situon de tiu ĉi malgranda lando inter ŝtatoj kaj popoloj, multe pli potencaj kaj batalemaj ol ĝi. Kian forton de rezisto kaj persisto en defendo montras la historio de tiu ĉi malgranda peco de Eŭropo! Ĝiaj limoj tremis sub la potencaj atakoj de l' konkerantoj, limoj, kiuj ofte etendiĝis de l' Balta maro ĝis la Mediteraneo. Jen vastega teritorio necesa al sufokata popolo, por ke ĝi povu libere ekspiri. Mi dezirus rememorigi al vi du faktojn, kiuj plej efike montras la gloron kaj tragedion de tiu ĉi lando en la mezo de Eŭropo. Ĝi estas la milito, sekvanta la morton de Hus, en kiu per draŝiloj defendis popolo sian landon, kontraŭ malamikoj venintaj el ĉiuj kvar flankoj de l' mondo. Kaj la dua fakto? Post kelkaj jardekoj ellaboris nia reĝo Jiří el Poděbrady similan planon, sur kiu bazas nun la Ligo de nacioj.

Nia lando estas ankaŭ krucovojo de l' naturo, lando kreita per fajro de vulkanoj, per sedimentoj de maroj kaj per degelantaj glacimontoj. Ĝi vidis ĉiujn geologiajn epokojn. Oni trovas ĉe ni ŝtoniĝintajn tropikajn arbarojn, morenojn de arktaj glaciejoj kaj la limajn partojn de l' mediteraneaj stepoj. Vi povas ankoraŭ vidi la praarbarojn, kiuj baris antaŭ 2.000 jaroj la vojon al la romaj legioj marŝantaj norden. ~~Ĝuste tie ĉi, kie komenciĝas nordaj arbaroj, ne plu kreskas la vinberujo, maizo kaj tabako.~~ La lasta geologia forto kaj homa laboro altrudis dum jarmiloj al la tero neforviŝeblan aspekton. Nur malofte oni trovas regionon tiel malkompaktigitan kaj ebenigitan per plugilo, nur malofte estas tiel eluzita ĉiu terpeco, kiel ĉi tiu. Kiel sur ŝaktabulo entendiĝas la kampoj en ebenaĵoj kaj sur montetoj ĝis la arbaroj: sed tie restis la mondo tia, kia ĝi eliris el la manoj de la kreinto; virga kaj apenaŭ konata.

Ĉeĥoslovakion oni envicigas inter ŝtatojn novajn. Jes, en la jaro 1928 ni festis la 10-an datrevenon de nia respubliko, sed unu jaron pli poste la 1.000-jaron de Bohemio. Ĝi estas ŝtato

multe pli malnova ol la reĝolando de Vilhelmo la Konkerinto, pli malnova ol la reĝolando (~~de la~~ ~~Kapotoj~~) de l' dinastio Capet kaj pli malnova ol la Roma Imperio de l' germana nacio. Preskaŭ 600 jaroj pasis depost la fondo de universitato en Praha, kiu estas la plej malnova en la meza Eŭropo. Sed ankoraŭ antaŭ 100 jaroj ne ekzistis en nia lando pli alta, ĉeĥa lernejo. Niaj eminentuloj Štítný, Hus, Chelčický kaj Komenský atestas sur la sojlo de l' moderna tempo la kulturen maturecon de nia lando; sed ne pasis pli ol 100 jaroj depost kiam estis denove kreata nia literatura lingvo kaj literaturo. Imagu al vi popolon, kies spirita evoluo estis rompita en la 17-a kaj 18-a jarcento: en la sama tempo, en kiu verkis Voltaire kaj Lessing, tiu ĉi popolo loĝanta en la koro de Eŭropo ne havis eĉ abocolibron por siaj infanoj. La lernejoj estis germanaj, la urboj germanigitaj. Nur en la vilaĝoj konserviĝis la popola lingvo, sed iliaj loĝantoj estis servutuloj. Antaŭ nur centkelkaj jaroj decidiĝis areto da romantikuloj, doni al tiu ĉi popolo de metiistoj, servistoj kaj kamparanoj librojn en ĉeĥa lingvo. Kaj jen, en la vivo de tiu ĉi popolo okazas mirakloj. Mácha, la unua vera poeto uzanta la revivigitan lingvon, Palacký, la unua historiisto, Dobrovský, la unua gramatikisto, ili estis geniuloj de tia formato, ke per unu fojo ili atingis la nivelon de l' samtempa kulturo. Antaŭ 70 jaroj ni ankoraŭ ne havis en Praha ĉeĥan teatron, ĉeĥa universitato estis ree malfermita nur antaŭ 50 jaroj! Mi ne scias, ĉu ekzistas en la historio de moderna kulturo kaj civilizacio iu okazintaĵo, kiu estus pli grandioza ol la revivigo de tiu ĉi malgranda sed energia popolo. Rigardu ankoraŭfoje la landkarton. Nenie atingas Ĉeĥoslovakio maron. Ĝiaj loĝantoj estas plej parte laboristoj kaj kamparanoj, la resto estas solidaj burĝoj, kiujn la naturo ne dotis per aventuremo kaj konkeremo. Kaj nun imagu al vi, ke tiuj ĉi viroj batalis kaj akiris sian politikan liberecon sur batalkampoj en Serbio, Dobruĝo, Lombardio kaj Francujo, en la montaro de Uralo kaj en Siberio ĝis Vladivostok, ke ili, estintaj militkaptitoj, kreis legiojn de volontuloj, kiuj batalis kontraŭ la monarĥio kiel ribelantoj, kiujn atendis aŭ venko aŭ pendigilo. 70.000 malbone armitaj soldatoj trabatalis sin tra la stepoj kaj praarbaroj de Siberio, ilia vojo patrujon estis vojo ĉirkaŭ la tuta terglobo, sed spite la survoja, senĉesa batalado ili fondis en vagonaro presejon kaj ilustritan ĵurnalon, bankon kaj teatron, eldonis librojn kaj aranĝis sportajn konkursojn. Post dujara, sendependa vivo, post aventura vojaĝo ĉirkaŭ la terglobo, ili revenis patrujon en disciplinaj regimentoj, pretaj denove iri batalkampon. Vi ĉiuj, kiuj ekkonis la batalon, juĝu mem la fizikan kaj moralan heroecon de tiuj ĉi 70.000 junaj viroj, gviditaj de 30-jaraj generaloj. Kaj nun diru, ĉu tiu ĉi lando estas vere malgranda?

Dum tricent jaroj la Habsburgoj tre malbone regis tiun ĉi landon. Ili forigis la religian liberecon, ili disdonis oficojn kaj bienojn al fremda nobelaro. El malnova ŝtato ili faris provincon malbone mastrumatan kaj el la popolo senrajtan malplimulton. Dum la tuta 19-a jarcento la Ĉeĥoj kaj Slovakoj batalis nur pro la rajto, libere uzi sian lingvon. Mi ripetas, por ke estu tute klare: neniu revolucio estis pli rajtigita ol tiu, kiun faris Ĉeĥoj kaj Slovakoj kontraŭ la monarĥio de l'Habsburgoj. Nenio estas pli natura ol batalo de tiel longe kaj tiel senidulge premata popolo por sia liberigo. Sed jen, nova historia fakto: areto da viroj kun la maljuna filozofo T.G.Masaryk kiel gvidanto, kelkaj ribelantoj kun grandaj ideoj sed preskaŭ sen helero en la poŝo, ekveturis Eŭropon kaj Amerikon, sciigante kaj pruvante al la batalantaj potencoj ne nur, ke la ĉeĥoslovaka popolo deziras esti libera, sed ankaŭ, ke necesas rekonstrui Eŭropon. Ili ne petis la grandajn popolojn nur por sia popolo, sed ili konvinkadis ilin, ke necesas liberigi ankaŭ Polojn, subkarpatajn Rusojn, Jugoslavojn kaj Rumanojn. Tiu ĉi maljuna filozofo, 4 jarojn pli poste revenas en sian patrujon kiel prezidanto de nova ŝtato. Lia juna kunlaboranto d-ro E.Beneš estas hodiaŭ fama kiel unu el la fondintoj de la monda pacorganizaĵo; la tria ribelanto, juna astronomo M.R.Štefánik, fariĝis generalo en la franca armeo kaj falegis kun aeroplano sur la limo revenante la sopiritan patrujon; Ikaro de l' moderna tempo. Vi vidas do, ke nia revolucio estis nekredeble romantika, kiel malmultaj okazintaĵoj en la historio.

Dum la lastaj 100 jaroj devis la ĉeĥoslovaka popolo batali kontraŭ la du regantaj popoloj en la pereinta aŭstro-hungara monarĥio por la plej primitivaj rajtoj de ĉiu popolo: por sia ekzistorajto kaj la rajto uzi sian lingvon. Tiu ĉi popolo de ribelantoj liberigis sin la 28-an de oktobro 1918, sed ĝi ne venĝis sin. Nenion ĝi detruis, sango ne fluis. Du - tri tagojn post la revolucio proponis la ĉeĥoslovaka registaro al la estroj de la germana malplimulto lokojn en la popola revolucia kunveno. Nun la germana malplimulto estas reprezentata per siaj propraj ministroj en registaro de lando, kiu

estis iam batalejo de ambaŭ nacioj.

Antaŭ la milito, dum la hungara reĝimo, havis 2 milionoj Slovakoj 276 popolajn lernejojn, neniun mezan lernejon kaj nur tri politikajn ĵurnalojn. Unu triono de la nomita nombro, t.e. la nombro de la hungara loĝantaro en la ĉeĥoslovaka respubliko, havas 800 popolajn lernejojn, 13 malpli kaj 8 pli altajn mezlernejojn kaj 49 politikajn gazetojn.

Jen faktoj montrantaj la trajtojn de nia popolo. Kiel ni vidis, la tuta Ĉeĥoslovakio konsistas el kontraŭoj: ĝi estas lando malnova kaj nova, ie tre civilizita, aliloke tre primitiva; tiuj ĉi ecoj estas tiel intermiksitaj, ke unuavide ĝi ŝajnas esti komplikita sen unueco. Ĝi estas belega lando - aliaj estas eble pli belaj, ĝi estas riĉa – aliaj estas pli riĉaj, ĝi atingis altan kulturen nivelon - aliaj estas ankoraŭ pli progresintaj. Sed neniun popolo en la mondo eble donis tiom da pruvoj pri sia persisto kaj taŭgeco al vivo, kiel ĉi tiu malgranda popolo, kiu en la mezo de Eŭropo konserviĝis kaj konserviĝos.

Tradukis Th.Kilian.